Kio estas IFEF?

La Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), starigita en 1909, estas fervojista asocio de esperantistoj celanta kunigi, pere de la internacia lingvo, diversfakajn profesiulojn de ĉiuj branĉoj de fervojo kaj transportado kaj la amikojn de fervojo en la tuta mondo.

IFEF ofertas forumon por

- interŝanĝi konojn kaj spertojn kun alilingvaj gekolegoj cele kontribui al la ĝenerala kaj faka kultura klerigo
- apliki kaj pluevoluigi Esperanton kiel fervojfakan lingvon
- renkontiĝi kun geamikoj en internaciaj aranĝoj
- lerni Esperanton

Agado de IFEF

- Ĉiujara **internacia kongreso** kun faka, turisma kaj kultura programo

- Ilustrita revuo **"Internacia Fervojisto"(IF)** inkluzivita en la membreco



- "**Fervojfakaj kajeroj**" - kolektoj de la plej signifaj diverstemaj prelegoj aperintaj ankaŭ en Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko (STEB)

- **„RailLexic“ -** Esperanto-sekcio de fervoja terminaro de **UIC** (Internacia Fervoja Unio), kiu enhavas terminojn en 23 lingvoj

- **Staĝoj** enlandaj kaj internaciaj por komencantoj kaj progresantoj, kunlabore kun **ILEI** (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

La federacio kunigas landajn asociojn, individuajn membrojn kaj amikojn de fervojo en pli ol 25 landoj

Aŭstrio	**Brazilo**	**Britio**	**Belgio**
Bulgario	**Ĉeĥio**	**Ĉinio**	**Danio**
Francio	**Finnlando**	**Germanio**	**Hispanio**
Hungario	**Israelo**	**Italio**	**Japanio**
Kroatio	**Kubo**	**Nederlando**	**Norvegio**
Pollando	**Rumanio**	**Rusio**	**Slovakio**
Slovenio	**Suda Koreio**	**Svedio**	**Svislando**

La IFEF - devizo estas: « La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn »

Se vi estas interesitaj, ni invitas vin membriĝi en IFEF (ĉu fervojistoj, ĉu nefervojistoj)!

Eĉ sen membriĝo, ni atendas de vi rakontojn pri viaj spertoj dum trajnvojaĝoj, informojn pri fervojo aŭ alispeca transporto en via lando aŭ regiono, pri trafiko moderna aŭ per nostalgiaj trajnoj.

Ne hezitu kaj skribu! Ni estas malferma organizo.

Se vi deziras kontakti nin bonvolu retpoŝte ĉe

- **ifefesperanto@gmail.com**
- **www.ifef.net**
- **www.facebook.com/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio-726039834155372/**